

Joseph Mohr,
Sankta nokto

tradukita de Manfredo Ratislavo

1. Sankta nokt' estas nun ja!
Dormas jam ĉie la
homoj krome de l' kara par'.
"Kara knabo en bukla harar',
dormu vi en la trankvil',
dormu vi en la trankvil'!"

2. Sankta nokt' estas nun ja!
Fil' de Di', kiom da
amo elradias el vi!
Nun per vi ja saviĝis ni,
Krist', pro via naskiĝ',
Krist', pro via naskiĝ'.

3. Sankta nokt' estas nun ja!
Savon nun ĝi al la
mondo portis, vidigas ĝi
la plenecon de l' graco al ni:
Dion en homa figur',
Dion en homa figur'.

4. Sankta nokt' estas nun ja!
La potenc' nun de la
patra amo versigigas en Lin,
grace, patre brakumas Li nin,
la popolojn de l' mond',
la popolojn de l' mond'.

...

Joseph Mohr,
Paca Nokt'!

tradukita de Hans-Georg Kaiser

Argiope-informo:
La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.
Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

Joseph Mohr,
Sankta nokto

tradukita de Richard Schulz

Pacplena nokt', dormas la mond'!
Sankta nokt', ĉie en rond'!
Viglas sole la tre kara par'.
Ĉarma knabo kun bukla harar',
Dormu en Dia ripozo,
Dormu en Dia ripoz'!

Pacplena nokt'! Aŭdas paŝtist' ...
Sankta nokt'! ... famon pri Krist'.
De l' anĝel' haleluja la vok'
Laute sonas tra ĉiu ajn lok':
Venis por savi vin Kristo!
Venis por savi vin Krist'!

Pacplena nokt'! Filo de Di'!
Sankta nokt'! Jen la Mesi'!
Amo ridas el via vizaĝ';
Nia estas fervora omaĝ',
Kristo, pro via naskiĝo,
Kristo, pro via naskiĝ'.

...

5. Sankta nokt' estas nun ja!
 La Sinjor' jam en pra-
 temp' promesis, ne plu kun koler',
 al ni homoj sur tiu ĉi Ter'
 la pardonemon de Li,
 la pardonemon de Li.

6. Sankta nokt' estas nun ja!
 Sonas Haleluja'
 sur la Tero nun ĉie ĉi.
 Al paŝtistoj sciiĝis ĝi:
 "La Savint' venis jen,
 la Savint' venis j44. 2.en."

*Traduko de la Germana poemo "Stille Nacht, heilige Nacht" de JOSEPH MOHR (*1792 – †1848) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2000-12.*

Arg-94-191 (2006-04-27 13:10:54)

*Traduko de la Germana poemo "Stille Nacht, heilige Nacht" de JOSEPH MOHR (*1792 – †1848) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, *1954-05-21).*

Arg-94-712 (2006-04-27 13:26:06)

*Traduko de la Germana poemo "Stille Nacht, heilige Nacht" de JOSEPH MOHR (*1792 – †1848) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26) en 1981-12.01.*

Arg-94-1191 (2014-12-24 17:39:38)

Tiu ĉi traduko aperis 1981-12-01 en la "Vestfaliaj Flugfolioj", kiujn eldonis la tradukinto Richard Schulu (Rikardo Shulco). Tie estis indikita ankau la melodio de tiu mondvaste konata germana kristnaska kanto. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.